

# Rashōmon<sup>1)</sup>

AKUTAGAWA Ryūnosuke<sup>2)</sup>

Iun vesperon iu servisto atendadis sub la pordego Rashōmon ke ĉesos pluvi. Neniu troviĝis sub la pordego krom li. Nur troviĝis lokusto, kiu kroĉis sin al granda ronda kolono, kies ruĝa koloro estis deŝirita en diversajn pecojn. Ĉar Rashōmon situis ĉe la granda strato Suzaku<sup>3)</sup>, devus troviĝi krom li kelkaj kun ichimegasa<sup>4)</sup> aŭ kun momieboshi<sup>5)</sup>, kiuj rifuĝis de pluvo. Sed tie staris neniu krom li.

La kialo kuŝis en tio, ke sinsekvaj pereigaj okazaĵoj, kiel tertremoj, kirloventoj, fajregoj kaj malsategoj okazis lastajn jarojn en Kioto, kio malprosperigis la urbon ĝis ekstremo. Laŭ malnovaj dokumentoj oni frakasis statuojn de Budho kaj budhismajn objektojn, kaj amasigis ĉe la stratoj la lignopecojn aŭ ruĝajn aŭ kun or- kaj arĝent-folioj por vendi kiel brullignojn. Tia estis la stato en la urbo, kaj tial neniu prizorgis la riparon de Rashōmon. Profitante la dezertecon vivis tie, vulpoj kaj niktireŭtoj kaj ankaŭ ŝtelistoj. Fine naskiĝis la kutimo ke oni alportis senparencajn mortintojn al la pordego kaj forlasis ilin. Pro tio neniu kuraĝis alproksimiĝi al la ĉirkaŭaĵo de la pordego post la vesperiĝo.

Anstataŭ homoj multaj korvoj kolektiĝis de ie. En la tago oni trovis multe da korvoj flugantaj kun grakoj cirkle ĉirkaŭ altaj pintoj de la tegmento. Precipe kiam la ĉielo super la pordego vesperruĝiĝis, oni klare vidis ilin, kiel se sezamoj dismetiĝus. Ili venis, kompreneble por beki karnon de mortintoj, tamen en tiu tago ili troviĝis nenie pro malfrua horo. Nur videblis blankaj makuloj de korvofekaĵo sur la ŝtona ŝtuparo, fendiĝinta tie kaj tie, el kies fendoj longaj herboj ĝermis. La servisto vestita per blua ellavita supervesto sidis sur la plej alta de la sep ŝtupoj, kaj foranime rigardadis pluvadon, donante zorgon al granda akno sur la dekstra vango.

La aŭtoro jam skribis, ke la servisto atendadis la pluvoĉeson. Sed li ne havis ideon kion fari eĉ se pluvado ĉesos. En ordinara tago li devus reiri al sia sinjoro. La sinjoro tamen maldungis lin antaŭ kelkaj tagoj. Kiel la aŭtoro skribis jam, la urbo, Kioto neordinare malprosperis tiutempe. Ĝuste pro la postinfluo de malprosperiĝo de la urbo, li devis maldungiĝi de la sinjoro longe servita. Pro tio la aŭtoro pli trafe priskribus, “enfermite de pluvo la servisto estis en perplekso, ne sciante kien iri.” Plie, la vetero de la tago ne malmulte sentimentale influis lin, homon de Heian-Epoko<sup>6)</sup>. Ŝajnis, ke la pluvo, kiu daŭris de fruvespero tute ne ĉesas. Li do de antaŭe aŭdadis senkonscie plaŭdadon de pluvo sur la granda strato Suzaku, pensante senorde, kion fari antaŭ ĉio por vivteni sin morgaŭ, por fari neeblan aferon ebla.

Rashōmon tute kovriĝis de pluvo, kaj la pluva plaŭdado venis unuigite al ĝi. Vespera mallumo venis pli malsupren kaj videblis supre, ke la tegmento de la pordego subtenas pezan mallumetan nubon sur siaj pintoj oblikve elstarantaj. Por fari neeblan aferon ebla ne estis loko honeste elekti rimedojn. Se oni elektus nekulpigeblajn rimedojn, tiam li devus morti pro malsato, aŭ sub tegmento de termuro, aŭ sur vojo, kio rezultigos lin forlasita kiel hundaĉo portita sur la supron de la pordego. Se oni ne elektus...Lia cerbumado atingis konkludon post longa cirkulado. Sed “se” restis ĉiam “se”, kaj kvankam li jesis ne elekti rimedojn, li ne povis havi kuraĝon aktive jesi la konkludon nature kondukitan de “se” : li ne povis ne fariĝi ŝtelisto.

Li ternis laŭte kaj ekstaris enue. Tiutempe en Kioto malvarmo estis tiel forta vespere, ke oni sopiris fajrujon. Vento kuris forte inter kolonojn kun la alveno de vespero. Ankaŭ La lokusto, kiu antaŭe kroĉis sin al la ruĝa kolono, malaperis.

Li kuntiris la kolon, kaj rigardis ĉirkaŭ la pordegon, levante la ŝultrojn kovritajn de flava subvesto

kaj blua supervesto. Li volis post ĉio tranokti ie, kie li povos kuŝigi sin kontraŭ vento kaj pluvo, aŭ kontraŭ la atento de aliuloj. Feliĉe li trovis larĝan ŝtuparon ankaŭ ruĝan, kiu kondukis al observejo. Eĉ se troviĝus homoj en la loko, ili estus jam mortintaj. Tion pensante, li komencis meti sur la plej malsupran ŝtupon sian piedon kun pajlita sandalo, atentante ke lia senornama glavo ligita al la talio ne estu elingigata.

Post minutoj estis unu viro, kiu observis ŝtupon meze de la larĝa ŝtuparo, kiu kondukis al observejo de Rashōmon, kuntirante sian korpon kiel kato, kun spiro haltigita. Febla lumo el la observejo tuŝis lian dekstran vangon. Sur la vango inter mallongaj vangharoj troviĝis ruĝe pusanta akno. Komence la servisto pensis facilanime, ke nur mortintoj estas supre. Sed kiam li ascendis du-tri ŝtupojn, li trovis, ke iu lumigas kaj movas la lumon. Tion li tuj eksciis, ĉar malklara flava lumo flagris en la subtegmento kun araneaĵoj ĉe anguloj. Devis esti neordinara homo, kiu lumigis en la observejo de la pordego en pluva nokto.

La servisto ŝtele ascendis la krutajn ŝtupojn kiel geko, rampante atingis la supron de la ŝtuparo, kaj timeme rigardis internon de la subtegmento mallevante sian korpon laŭeble malalten, sed etendante sian kolon laŭeble antaŭen.

Li trovis en la subtegmento, kiel li ofte aŭdis, kadavrojn senzorge forlasitajn, sed li ne povis kalkuli, ĉar la lumo prilumis pli malvaste ol li pensis. Li trovis nur, kvankam obskure, ke kelkaj kadavroj estas kovrataj per vestaĵoj sed aliaj ne, kaj kompreneble ŝajnis, ke viroj kaj virinoj miksiĝas. Iuj kuŝis malorde sur la planko malfermante la buŝon, kaj iuj etendante la manojn kiel pupoj el argilo, kaj do oni ne povus kredi, ke ili estis iam vivantaj. Altajn partojn de la kadavroj kiel ŝultrojn kaj bruston prilumis malhela lumo, kio ŝajnis ombbron de malaltaj partoj kontraste pli malluma. Ili mutis eterne.

Li kovris sian nazon per la mano pro fetoro de putraj kadavroj. Momenton poste tamen li forgesis kovri sian nazon, ĉar ia forta sento preskaŭ tute rabis lian flarsenton.

Tiam unuafoje liaj okuloj trafis homon kaŭrantan inter la kadavroj. La homo estis malalta, malgrasa kaj grizhara, brune vestita maljunulino simila al simio. Ŝi portis fajrantan lignopecon el pino en la dekstra mano kaj enrigardis la vizaĝon de unu kadavro. La kadavro povis esti virina laŭ longeco de haroj. La servisto forgesis spiri dum momento duone pro timo kaj duone pro scivolo. La servisto sentis, ke "la haroj de la tuta korpo disstariĝis" laŭ la esprimo de la originalo<sup>7)</sup>. La maljunulino enmetis la lignopecon inter plankotabulojn, kaj metinte siajn manojn sur la kolon de la longe rigardita kadavro, komencis eltiri longajn harojn de la kadavro, unu post la alia, kiel se patrino de simio kaptas pedikojn de sia infano. Ŝajnis, ke haroj estas eltirebla per mano.

Ju pli multaj haroj estis eltiritaj, des pli da timo malaperis el lia koro, kaj samtempe naskiĝis granda abomeno kontraŭ ŝi. Estus erare diri, ke tio estas kontraŭ ŝi. Pli ĝuste, naskiĝis pli da antipatio kontraŭ ĉia malbono minuton post minuto. Se iu refoje prezentus al li la saman demandon, pri kiu li meditis antaŭe ĉe la pordego, ĉu morti pro malsato, aŭ ĉu fariĝi ŝtelisto, tiam li volonte preferus morti pro malsato. Lia abomeno kontraŭ malbono tiom ekbrulis en la koro same kiel la fajranta lignopeco el pino, kiun enmetis la maljunulino sur la plankon.

Kompreneble li ne povis kompreni kial la maljunulino eltiras harojn de la mortinto. Li do ne divenis racie, ĉu la ago estas bona aŭ malbona.

Sed malgraŭ ĉio, eltiri harojn de mortinto en la observejo de la pordego Rashōmon en pluva nokto estis per si mem malpermeseble al li. Kompreneble li jam forgesis, ke li intencis fariĝi ŝtelisto antaŭ

momento.

Sekve, streĉante la krurojn li subite ĵetis sin de la ŝtupo sur la plankon. Kaj pretigante sin elingigi la senornaman glavon, li iris per granda paŝo al la maljunulino. Ne necesas diri, ke ŝi konsterniĝis. Ŝi saltis kvazaŭ pafita de arko.

“Ci, kien iras?”

Barante ŝian vojon li insulte demandis ŝin, kiu stumblante ĉe la kadavroj forkuris konfuzite. Ŝi ankoraŭ provis forpuŝi lin kaj forkuri. La servisto kontraŭstaris kaj repuŝis ŝin. La du homoj luktis mute inter la kadavroj dum kelka momento. Sed rezulto estis memkomprenebla. Fine li prenis ŝin je la brakoj kaj faligis ŝin perforte. Ŝiaj brakoj estis nur el haŭto kaj osto, kiel piedoj de koko.

“Diru, kion ci faradis ĉi tie. Se ne, per ĉi tiu...”

Li forpuŝis ŝin, elingigis la glavon antaŭ ŝiaj okuloj kaj minacis ŝin per blanka koloro de la ŝtalo. Malgraŭe ŝi silentis. Ŝi tremigis la manojn, malfermis la okulojn tiel larĝe, kvazaŭ la okulgloboj elvenus el la palpebroj, sed ŝi silentis obstine kiel mutulo. Vidinte tion, li unufoje klare konsciis, ke li mem regas vivon de la maljunulino. Tiu konscio nerimarkite kvietigis abomenon ĝis nun flamintan en lia koro. Nur restis en li kontento, kiu naskiĝis ĉe plena sukceso de ia afero. Li do iom kviete diris rigardante malsupren al ŝi.

“Mi ne estas inspektoro, sed nura vojaĝanto ĵus pasanta sub la pordego. Do mi tute ne intencas aresti vin. Vi nur bezonas rakonti al mi, kion vi faras en tia tempo sur la pordego.”

Aŭdinte tion, ŝi pligrandigis la malfermitajn okulojn, kaj fikse rigardis lian vizaĝon per la okuloj akraj kiel de karnovora birdo kun ruĝaj palpebroj. Kaj ŝi movis la lipojn preskaŭ kuniĝantajn kun la nazo pro sulkiĝo, kiel se ŝi maĉus. Videblis, ke la elstaranta adampomo moviĝas ĉe la maldika gorĝo. Tiam el la gorĝo venis al liaj oreloj spireganta voĉo simila al la korva.

“Per la eltiritaj haroj...mi volis fari perukon.”

La servisto perdis intereson pro la banala respondo. Sed samtempe en lia koro denove aperis abomeno kune kun senkompata malrespekto. La humoro eble komuniĝis al ŝi, kaj ŝi, tenante en la mano longajn harojn el kapo de mortinto balbutis, kvazaŭ bufo murmurus.

“Vere, eltiri harojn de mortinto estas tre malbone. Sed ĉi tiuj mortintoj indas je tia puno. La virino, kies harojn mi eltiris, vendadis ĉe atendejo de gardistoj sekigitajn pecojn de serpentoj, tranĉitajn je 10 centimetroj, ŝajnigante ilin sekigitaj fiŝoj. Se ŝi ne mortus pro la epidemio, ŝi ankoraŭ nun vendus ilin. Estas ridinde, ke la gardistoj ĉiam aĉetis ilin por flankmanĝaĵo, dirante ke la sekigitaj fiŝoj estas bongustaj. Mi ne diras, ke ŝi faris malbonon. Se ŝi ne farus tion, ŝi devus morti pro malsato. Pro neceso ŝi faris tion, ĉu ne? Tiel same, mia faro estas pro neceso, do ne malbona afero. Mi devus morti, se mi ne farus same. Ŝi bone komprenis la neeviteblan konduton, kaj do ŝi pardonos min.”

Ŝia ĉefa parolo estis tia.

Li eningigis la glavon kaj tenante ĝin je tenilo per maldekstra mano aŭskultis senkore la parolon. Kompreneble li aŭskultis ŝin tuŝante per dekstra mano la ruĝe pusantan aknon sur la vango. Sed dum la aŭskultado naskiĝis ĉe li ia kuraĝo, kia mankis antaŭe sub la pordego. La kuraĝo estis tute kontraŭ al tio ĉe la momento, kiam li kaptis la maljunulinon veninte sur la pordego. Ĉu morti pro malsato, ĉu fariĝi ŝtelisto, tio jam ne ŝancelis lin. En tiu momento tute elpeliĝis ĝis preskaŭ nepenseble el la ideo morti pro malsato.

“Ĉu vere?”

Li certigis ŝin insulte, kiam ŝi finparolis. Kaj li antaŭeniris unu paŝon, subite demetis la dekstran manon de la akno, kaj prenante ŝin je la kolo, diris al ŝi kun tono kvazaŭ almodanta.

“Do, vi ne malbenus min, eĉ se mi rabus de vi viajn vestaĵojn. Ankaŭ mi devas morti se mi ne rabas.”

Rapide li rabis de ŝi ŝiajn vestaĵojn, kaj sovaĝe piedbatis ŝin kroĉiĝantan al liaj piedoj, sur kadavrojn. Oni kalkulis nur kelkajn paŝojn ĝis la ŝtuparo. La servisto fulme descendis la krutan ŝtuparon kaj malaperis en la fundon de la mallumo.

Post kelka tempo el inter la kadavroj levis sin la maljunulino nuda, kiu ĝis tiam kuŝis sur la planko kiel mortinta. Ŝi rampis kvarpiede al la ŝtuparo sub la ankoraŭ restanta lumo, murmurante kaj ĝemante. Ŝi rigardis malsupren de la pordego, mallevante kapon kun kurtaj blankaj haroj. Ekstere nur regis tute malluma nokto.

Neniu konas kien iris la servisto.

Tradukis AOYAMA Tooru

(rim)

- 1) Rashōmon (raŝoomon): ĉefpordego ĉe la strato Suzaku en Kioto
- 2) AKUTAGAWA Ryūnosuke (akutagaŭa rjuunosuke): 1892-1927, verkisto. Li verkis diverstemajn novelojn per malsamaj intelektaj stiloj. Li foje pruntis temojn el klasikaj rakontoj kaj elmontris la internan egoismon de homoj. Tri novelaroj aperis en Esperanta traduko. *La Kapao kaj aliaj rakontoj* (JEL, 1954), *Tabako kaj diablo* (Librejo Satano, 1996), *Noveloj de Akutagawa Ryūnosuke* (KLEG, 2010)
- 3) la strato Suzaku: antikva ĉefstrato en Kioto, de la norda pordego Rashōmon ĝis la suda pordego Suzakumon
- 4) *ichimegasa* (iĉimegasa): ĉapelo, kiun tiama virino portis ekstere, el kano aŭ karekso
- 5) *momieboshi* (momieboŝi): ĉapo, kiun tiama viro portis sub kasko
- 6) Heian-epoko: 794-1185
- 7) la originalo: *Konjaku* (konĝaku), kiu konsistas el pli ol mil rakontoj de Japanio, Ĉinio kaj Hindio, publikigita en la 12a jarcento.